

47 ASIZANO

„Ankaŭ mi devis foje juĝi," diris sinjoro Firbas tusetante," ĉar mi estis lote elektita kiel asizano. Ĝus tiam venis antaŭ la asizon kazo de Luiza Kadaníková, kiu murdis sian edzon. En la asizo ni estis ok viroj kaj kvar virinoj. Nu bele, diris ni viroj anticipe pli malpli silente inter ni, la kvar ulinoj penos liberigi la virinon! Kaj tial jam anticipe ni hardis nin per senkompato kontraŭ Luiza.

Entute ĝi estis sufiĉe ordinara kazo de malfeliĉa geedzeco. Tiu Kadaník estis privata geometro kaj edziĝis al virino je dudek jaroj pli juna; Luiza estis knabineto, kiam ŝi edziniĝis, kaj troviĝis atestanto, kiu depoziciis, ke jam tagon post la geedziĝo la juna sinjorino ploris, pala kiel kreto, kaj tremanta pro naŭzo, kiam la novedzo volis ŝin tuŝi. Ofte mi pensas, kian teruran sperton travivas iam naiva kaj sensperta knabino post la geedziĝo; imagu, eble ŝia edzo estas kutimiĝinta je publikulinoj kaj laŭ tio kondutas. Nu, tion neniuj viroj scias imagi.

Sed prokuroro malkovris alian ateston, nome ke Luiza jam antaŭ la geedziĝo amaĵis kun ia studento kaj kun tiu ŝi korespondis ankoraŭ post la edziĝfestoj. Unuvorte, tuj post la edziĝfestoj montriĝis, ke la edzeco ne harmonias; sinjorino Luiza vidigis fizikan naŭzon al sia edzo; post unu jaro ŝi abortis kaj ekde tiu tempo ŝi suferis je iaj virinmalsanoj. Sinjoro geometro serĉis kompenson ie alie kaj hejme faris skandalajn proĉiujn helerojn.

Tiun malfeliĉan tagon denove ili disputis pro ĉinkrepaj ĉemizoj aŭ io alia, kaj sinjoro geometro komencis surmeti ŝuojn, ne emante tedi sin hejme. En tiu momento proksimiĝis al li Luiza de malantaŭe kaj pafis lin per revolvero en la nukon. Poste ŝi elkuris koridoren kaj frapegis pardonon ĉe najbaroj, por ke ili iru al ŝia edzo, ke ŝi mortigis lin kaj iras sin anonci al la polico; sed sur la ŝtuparo ŝi falruliĝis en konvulsiojn. Tio estis la tuta kazo.

47 POROTCE

„Teda já jsem jednou musel soudit," řekl pan Firbas odkašlávaje, „protože jsem byl vylosován za porotce. Tehdy zrovna přišel před porotu ten případ Lujzy Kadaníkové, co zavraždila svého manžela. Nás bylo v porotě osm mužských a čtyři ženské. Tě bůh, řekli jsme si my mužští předem víceméně mlčky, ty čtyři baby budou hledět tu ženskou osvobodit! A tak jsme se už předem proti té Lujze zatvrdili. On to byl vcelku dost obyčejný případ nešťastného manželství. Ten Kadaník byl civilní geometr a vzal si ženu o dvacet let mladší; Lujza byla děvčátko, když se vdávala, a našel se svědek, který vypověděl, že už den po svatbě mladá paní plakala, bledá jako křída, a otrásala se odporem, když se jí novomanžel chtěl dotknout. Kolikrát si myslím, jaká to někdy musí být hrozná zkušenost, co takové nevinné a nezkušené děvče udělá po svatbě; vemte si, že její muž je třeba zvyklý na holky a chová se podle toho. Inu, to si žádný chlap ani nemůže představit.

Ale státní návladní zase vyšťáral jiné svědectví, že prý ta Lujzička měla už před svatbou techtle mechtle s nějakým studentem a že si s ním dopisovala i po sňatku. Zkrátka už po svatbě se ukázalo, že to manželství neštymuje; paní Lujza dávala najevo fyzický odpor k svému muži; po roce potratila a od té doby měla nějaké ty ženské nemoce. Pan geometr si to hleděl nahradit jinde a doma dělal kravály pro každý krejcar.

Onoho nešťastného dne měli zase výstup kvůli krepdešínovým košilím nebo čemu a pan geometr se začal obouvat, že se doma otravovat nebude. V tu chvíli se k němu Lujzička přiblížila odzadu a střelila ho z browningu do týlu. Potom vyběhla na chodbu a bouchala u sousedů na dveře, aby šli k jejímu muži, že ho zabila a že se jde udat; ale na schodech se svalila v křečích. To byl ten celý případ.

Nun ni sidis dek du, por prijuĝi ŝian kulpon. Onidire Luizeta estis bela knabino, sed memkomprene, enketaresto ne beligas virinojn; ŝi estis kvazaŭ ŝvelpufa, kaj nur el ŝiaj palaj vangoj fulmetis malbonaj kaj malamaj okuloj. Supre tronis tribunala prezidanto, enkorpiginta justeco, ege digna kaj preskaŭ pastreca en la nigra talaro.

La prokuroro estis la plej bela prokuroro, kiun mi iam vidis: forta kiel taŭro, streĉita kaj batalema, kiel bone nutrata tigro; videblis, kun kia ĝuo pro forto kaj superforto li ĵetiĝas sur sian viktimon, kiu tie malsupre tiom freneze malamis lin per brulaj okuloj.

Advokato de la akuzitino ĉiumomente eksaltis kaj disputis kun la prokuroro; por ni asizanoj ĝi estis ĝena, ĉar de temp' al tempo tio aspektis, ke ne temas pri juĝo super la virino murdintino, sed pri ia konflikto inter la pledanto kaj la prokuroro.

Kaj tie estis ankaŭ ni laikaj juĝantoj; ni venis juĝi laŭ nia homa konscienco, sed malgraŭ la plej bona volo ni plejparte senespere enuis dum la advokataj pedantaĵoj kaj juĝaj formalajoj. Fone premiĝis aŭskultantaro kaj ĝue asistis la kazon de Luiza Kadaníková; kiam ŝi estis iam en dilemaj embarasoj kaj ĉaspelitate silentis, aŭdeblis, kiel la homoj kvazaŭ gruntas pro plezuro."

Sinjoro Firbas ekfrotis sian frunton, kvazaŭ li ŝvitus. „Iam ŝajnis al mi, kvazaŭ mi ne estus lote elektita juĝanto, sed homo torture enketata; kvazaŭ mi mem estu eksaltanta kaj dironta, mi konfesas ĉion, traktu min laŭvole. Plue ni havis ĉi tie atestantojn; ĉiu gravmiene atestis, fanfaronante pro iaj scioj; kaj el la depozicioj vi sentis la tutan eturbon, amason da malamo, klaĉojn, protektadon, kaŝparolojn, envion, intrigojn, politikon kaj enuon.

Laŭ la atestantoj estis la mortinto honesta kaj sincera homo kaj brava civitano, ĝuanta la plej bonan renomon; plue ĵupĉasanto kaj avarulo, brutala karaktero, malĉastulo kaj krudulo; unuvorte, vi povas elekti.

Sinjinorino Luiza statis pli malbone: onidire ŝi estas flirtema kaj malŝparema sinjinorino, portanta silkan tolaĵon, neglektanta la mastrumadon, faranta ŝuldojn -

Ted' nás sedĉelo dvanáct, abychom posoudili její vinu. Prý ta Lujzička bývala pěkné děvče, ale to víte, vyšetřovací vazba ženským krásy nepřidá; byla jako naduřelá, a jen jí z těch bledých tváří žhnuly takové zlé a nenávislné oči. Nahoře trůnil předseda soudu, vtělená spravedlnost, strašně důstojný a skoro kněžský v tom černém taláru.

Státní zástupce byl ten nejkrásnější návladní, kterého jsem kdy viděl: silný jako býk, napjatý a bojovný jako dobře živený tygr; bylo vidět, s jakou rozkoší síly a převahy se vrhá na tu svou kořist, která ho tam dole tak šíleně nenáviděla těma palčivýma očima.

Advokát obžalované každou chvíli podrážděně vyskočil a hádal se se státním zástupcem; nám porotcům to bylo trapné, protože chvílemi to bylo, jako by nešlo o soud nad ženou vražednicí, nýbrž o jakýsi spor mezi obhájcem a návladním.

Pak jsme tam byli my soudcové z lidu; přišli jsme soudit podle svého lidského svědomí, ale při nejlepší vůli jsme se většinou zoufale nudili při těch advokátských cavykách a soudních formalitách. Vzadu se tlačilo auditorium a pášlo se na případu Lujzy Kadaníkové; když někdy byla v ouzkých a uštvaně mlčela, bylo ty lidi slyšet, jak zrovna chrochtají libostí."

Pan Firbas si přetřel čelo, jako by se potil. „Mně vám chvílemi bylo, jako bych nebyl vylosovaný soudce, ale člověk na skřipci; jako bych já sám měl vyskočit a říci, přiznávám se ke všemu, dělejte si se mnou, co chcete. Pak jsme tu měli svědky; každý důležitě vypovídal, jaksi se nadýmaje, že něco ví; a z těch výpovědí jste cítili celé to maloměsto, tu hromadu záští, klepů, protekce, šuškáni, závisti, pletich, politiky a nudy.

Podle těch svědků byl nebožtík čestný a přímý muž a řádný občan, těšící se nejlepší pověsti; dále děvkař a lakomec, brutální povaha, nemrava a hrubec; zkrátka můžete si vybrat.

Paní Lujza dopadla hůř: prý je to záletná a marnotratná panička, nosila hedvábné prádlo, o domácnost se nestarala, dluhy dělala -

La prokuroro kliniĝis kun glacia rideto: Akuzitino, ĉu vi jam antaŭ la geedziĝo intime rilatis kun iu viro? La akuzitino silentis, nur griza ruĝo pasis ŝiajn vangojn. La advokato eksaltis: Mi petas, ke estu enketata tiu, kiom Kadaník misuzis, kiam ŝi servis ĉe li. Li havis infanon kun ŝi. La prezidanto de la tribunalo malsereniĝis; videblis, ke li pensas, miadio, ja la proceso plilongiĝos!

Dume senfine treniĝis hontigaj hejmaj aferoj: kiu el ili estis kaŭzo de la geedzaj malkonkordoj, kiom ricevadis sinjorino Luiza por la mastrumado, ĉu ŝia edzo havis kaŭzon ĵaluzi. Iam dum la tutaj horoj ŝajnis al mi, ke oni ne parolas pri morta Kadaník kaj lia edzeco, sed pri mi aŭ iu ajn alia asizano aŭ mi ne scias pri kiu el ni ĉiuj. Miadio, kion ĉi tie oni diras pri la mortinto, tion ankaŭ mi faris; tiaj aferoj okazas eble ĉie, kial paroli pri tio? Al mi ŝajnis, kvazaŭ tie oni iom post iom senvestigus nin ĉiujn, nin virojn kaj virinojn; kvazaŭ oni lavus niajn proprajn disputojn, traventolus niajn malpurajn intimaĵojn, eltiradus sekretojn el niaj litoj kaj kutimoj. Tio estis, kvazaŭ oni priskribus tie nian propran vivon, sed iel malbone kaj kruele, ke ĝi similis al la infero.

Tiu Kadaník vere ne estis la plej malbona viro; li estis iom maldelikata, al la edzino bruska kaj humiligadis ŝin; li estis kruda kaj avara, ĉar li peze kaj malmulte perlaboradis; li estis virindeloganto, li delogadis servistinojn kaj intime rilatis al iu vidvino, sed eble tio estis pro spito kaj ofendita vira vanteco, ĉar sinjorino Luiza lin malamis, kvazaŭ li estus abomena insekto.

Kaj strange estis, kiam iu atestanto de la advokato atestis kontraŭ la murdito, kia kverelema li estis kaj etanima, brutala kaj sekse kruda kaj paŝaeca homo, en ni viraj asizanoj moviĝis io kiel malplaĉo kaj solidareco: stop! ni sentis, se pro ĉi tio ni devus esti pafmortigataj - Sed kiam alia atestanto pligravigis kulpon de sinjorino Luiza, ke ŝi estis leĝeranima, paradema kaj ankoraŭ alia, ni viroj en la benkoj de asizanoj sentis pli vere deĝnon,

Státní zástupce se naklonil s ledovým úsměvem: Obžalovaná, měla jste už za svobodna důvěrné styky s některým mužem? Obžalovaná mlčela, jen jí lícemi kmitl šedivý ruměnc. Advokát vyskočil: Prosím, aby byla slyšena ta a ta, které Kadaník zneužil, když u něho sloužila. Měl s ní děcko. Předseda soudu se zachmuřil; bylo vidět, že si myslí, proboha, vždyť se nám líčení protáhne!

Zatím se bez konce rozvlékaly ty trapné domácí záležitosti: kdo z těch dvou zavadával podnět k manželským rozbrojům, kolik dostávala paní Lujza na domácnost, měl-li její muž důvod žárlit. Někdy se mně po celé hodiny zdálo, že se nemluví o mrtvém Kadaníkovi a jeho manželství, ale o mně nebo o kterémkoliv druhém porotci, nebo já nevím o kom z nás všech; bože, co tady říkají o tom mrtvém, to já dělal taky, takové věci se snad dějí všude, proč o tom mluvit. Bylo mně, jako by tam kus pokuse svlékali nás všechny, nás muže a ženy; jako by vypírali naše vlastní hádky, provětrávali naše špinavé intimity, vytahovali tajnosti našich postelí a zvyků. Ono to bylo, jako by se tam líčil náš vlastní život, ale tak nějak zle a krutě, že se podobal peklu.

Ten Kadaník nebyl vlastně nejhorší chlap; byl trochu drsný, na ženu se utrhoval a ponižoval ji; byl tvrdý a lakomý, protože těžce a málo vydělával; byl korouhevník, sváděl služky a udržoval poměr s nějakou vdovou, ale snad to bylo z trucu a uražené mužské ješitnosti, protože ho paní Lujza nenáviděla, jako by byl odporný hmyz.

A to vám bylo zvláštní, když některý svědek advokátův vypovídal proti zavražděnému, jaký to byl svárlivý a malicherný, brutální, pohlavně hrubý a pašovský člověk, v nás mužských porotcích se pohnulo něco jako nelibost a solidarita: halt! cítili jsme, kdybychom pro tohle měli být odstřelováni - A když zase jiný svědek přitěžoval paní Lujze, že byla lehkovážná, parádívá a kdesi cosi, cítili jsme my mužští v lavici porotců spíš cosi jako blahovůli,

ion, kio protektis ŝin, dume la kvar virinoj inter ni lippremis kaj havis nepardonemajn okulojn. Dum horoj kaj tagoj treniĝis la geedza infero, vidita pere de okuloj de servistinoj kaj kuracistoj, najbaroj kaj klaĉulinoj: kvereloj kaj ŝuldoj, malsanoj, hejmaj scenoj, ĉio ĉi malbona, histeria kaj turmenta, kio suferigis la homan paron; kvazaŭ oni dismetus antaŭ ni homajn internaĵojn en ilia povra abomeno.

Aŭskultu, mi havas bonan kaj bonmoran edzinon; sed de temp' al tempo mi ne vidis tie malsupre Luizan Kadaníková, sed mian propran edzinon, mian Lída, akuzitan pri tio, ĉar per pafo en la nukon ŝi mortigis sian edzon Firbas; mi sentis en okcipito teruran kaj kruelan doloron de la vundo; mi vidis, kiel Lída pala kaj nebele pufa, kunpremas la lipojn kaj akuzas min per okuloj frenezaj pro teruro, abomeno kaj humiligo. Tio estis Lída, kiun oni ĉi tie senvestigis kaj kvaronumis; tio estis mia edzino, mia dormoĉambro, miaj sekretoj, mia aflikto, miaj maldelikataĵoj; preskaŭ mi estus ekploronta kaj dironta: jen vidu Lída, kien vi alkondukis nin! Mi fermadis la okulojn, por senigi min de la terura vizio; sed en la mallumo estis la depozicioj de la atestantoj ankoraŭ pli turmentaj; kaj kiam mi ekokulegis Luizan, angoriĝis mia koro: Miadio, Lída, kiel vi ŝanĝiĝis!

Kaj kiam mi revenadis hejmen de la proceso, atendis min Lída kun avida demando: Nu kio, ĉu oni kondamnos ŝin? Ĝi estis siaspece sensacia proceso, kiu ĉefe interesis sinjorinojn. Mi, deklaris mia edzino, ardanta pro intereso kaj ekzalto, mi kondamnos ŝin! Tio ne rilatas vin, mi abruptis; estis al mi terure paroli pri tio.

La lastan vesperon antaŭ la verdikto deprimis min ia maltrankvilo; mi promenis nerveze tra la ĉambro kaj meditis. Eble ni liberlasos Luizan; kial estus en la asizo kvar virinoj? Ankoraŭ unu voĉo kontraŭ la kulpo kaj ŝi estos liberigita; nu, homo, ĉu tio estos via voĉo? Je tio mi ne trovis respondon; subite nenial venis al mi malagrabla ideo: Ja ankaŭ mi havas en la noktotablo ŝargitan revolveron - kutimo el la militempo;

neĉo takového, co ji bralo do ochrany, zatímco ty čtyři ženské mezi námi sevřely rty a dostaly takové nesmiřitelné oči. Po hodiny a dny se rozvlékalo to manželské peklo, viděné očima služek a lékařů, sousedů a klepen: sváry a dluhy, nemoce, domácí výstupy, všecko to zlé, hysterické a trýznivé, co snáší lidský pár; jako by před námi rozvěšovali lidské vnitřnosti v celé jejich ubohé ošklivosti.

Poslyšte, já mám hodnou a slušnou ženu; ale chvílemi jsem tam dole neviděl Lujzu Kadaníkovou, ale svou vlastní ženu, svou Lídu, žalovanou za to, že ranou do týlu zastřelila svého muže Firbase; já cítil v záhlaví strašnou a třeskutou bolest té rány; já viděl, jak Lída, bledá a nehezky odulá, svírá rty a žaluje mne očima šílenýma hrůzou, odporem a ponížením. To byla Lída, koho tady svlékali a kuchali; to byla má žena, moje ložnice, moje tajnosti, mé hoře, mé hrubosti; byl bych málem zaplakal a řekl: Tak vidíš, Lído, kam jsi nás to přivedla! Já jsem zavíral oči, abych se zbavil té strašné vidiny; ale potmě byly ty výpovědi svědků ještě mučivější; a když jsem vytřeštil na Lujzu oči, sevřelo se mi srdce: Bože, Lído, jak jsi se změnila!

A když jsem se z té poroty vracel domů, čekala mě Lída s dychtivou otázkou: Tak co, bude odsouzena? On to byl svým způsobem senzační proces, který zajímal hlavně paničky. Já, hlásala má žena, planoucí zájmem a vzrušená, já bych ji odsoudila! Po tom ti nic není, rozkřikl jsem se na ni; mně bylo hrozno mluvit s ní o tom.

Poslední večer před verdiktem mě svíral takový neklid; běhal jsem po pokoji a uvažoval: Snad Lujzu pustíme; k čemu by byly v porotě ty čtyři ženské? Ještě jeden hlas proti vině, a bude osvobozena; tak co, člověče, bude to hlas můj? Na to jsem odpověď nenašel; z ničeho nic mě obešla taková nepříjemná myšlenka: Vždyť i já mám v nočním stolku nabitý revolver - to je takový zvyk z vojny;

kiel facile povus okazi, ke foje ĝi konvenus al mia edzino Lída! Mi prenis la revolveron en la manon: Ĉu mi kaŝu cin aŭ entute mi seniĝu de ci? Ankoraŭ ne, mi ekrikanis, ĝis post la rezulto kun Luiza! - Kaj poste denove mi komencis turmenti min: Jes, kiel ĝi finiĝos - kaj kion mi, miadio, kiel mi, kiel mi voĉdonu?

La lastan tagon parolis la prokuroro; li parolis bone kaj dure; mi ne scias, kiu rajtigis lin al tio; sed li prenis parolon en nomo de homaj familiaj rilatoj. Mi aŭdis lin kvazaŭ elfore, kiel li tiom ege kaj strange emfazas la vortojn familio, hejma vivo, geedzeco, edzo, edzino, tasko kaj devoj de edzino; onidire ĝi estis unu el plej brilaj paroloj antaŭ la tribunalo.

Poste komencis paroli la advokato de sinjorino Luiza kaj faris teruran aferon: li bazis sian pledon sur sekse patologia analizo. Li estis pruvanta, kian naŭzon devas senti sekse inerta virino, aŭ kiel oni diras frigida virino, al brutala masklo; kiel ŝia fizika abomeno kreskas al malamo; kia tragika viktimo estas tia virino en senpovo kontraŭ volo kaj voluptemo de cinika seksa tirano.

En tiu momento estis senteble, kiel la tuta asizo iĝas malfavora kaj froste senkompata kontraŭ sinjorino Luiza, kiel en la asizo komenciĝas subkonscia rezisto kontraŭ io nenormala, kio desorganizas kaj endanĝerigas la homan socion. La kvar virinoj en la asizo estis palaj kaj blovis el ili malamikeco al la virino atencinta ion kiel devontigon. Kaj la idioto advokato fervore ĉarpiis sian seksan tezon. Prezidanto de la tribunalo okulvitris indulge indignan mienon de la asizo kaj en sia resumo provis savi la situacion; li parolis nek pri familio, nek pri seksa servuteco, sed pri murdo de homo. Ni asizanoj senpeziĝis; sincere dirite, el tiu flanko estis la kazo al ni pli digestebla, simpla kaj preskaŭ tolerebla.

Ĝis la lasta momento mi ne sciis, kiel mi respondos demandon pri la kulpo. Sed kiam oni prezentis al ni la demandon: Ĉu Luiza Kadaniková estas kulpa, ke ŝi kun intenco murdi pafmortigis sian edzon Janon Kadaník? -

jak snadno by se mohlo stát, že by se někdy šiknul mé ženě Lídě! Vzal jsem ten revolver do ruky: Neměl bych tě ukrýt nebo se tě vůbec zbavit? Ještě ne, zašklebil jsem se, až jak to dopadne s Lujzou! - A pak jsem se začal mučit znova: Ano, jak to dopadne - a co já, proboha, jak budu, jak mám hlasovat já?

Poslední den mluvil státní zástupce; mluvil dobře a tvrdě; nevím, kde k tomu vzal právo, ale chopil se slova jménem lidských rodinných vztahů. Já slyšel jako z dálky, jak klade takový veliký a divný důraz na slova rodina, domácí život, manželství, muž a žena, úkol a povinnosti ženy; říkalo se, že to byla jedna z nejskvělejších řečí před soudem.

Potom se ujal slova advokát paní Lujzy a provedl strašnou věc: založil svou obhajobu na sexuálně patologické analýze. Dokazoval, jaký odpor musí cítit pohlavně chladná, nebo jak se říká, frigidní žena k brutálnímu muži samci; jak její fyzický odpor roste v nenávisť; jakou tragickou obětí je taková žena, vydaná vůli a chtíčům bezohledného pohlavního tyрана.

V tu chvíli bylo cítit, jak se celá porota obrací a mrazivě zatvrzuje proti paní Lujze, jak v té porotě propuká podvědomý odpor proti čemusi abnormálnímu, co nějak rozvrací a ohrožuje lidský řád nebo co. Ty čtyři ženy v porotě byly bledé a číslo z nich nepřátelství k té ženě, která porušila cosi jako závazek. A pitomec advokát horlivě rozšlapával svou sexuální tezi. Předseda soudu brejllil shovívavě na pohoršený výraz poroty a ve svém resumé hleděl zachránit situaci; nemluvil o rodině ani o pohlavním nevolnictví, ale o zavraždění člověka. Nám porotcům se ulevilo; upřímně řečeno, z té stránky nám byl ten případ jaksí víc požitelný, prostý a skoro snesitelný.

Do poslední chvíle jsem nevěděl, jak odpovím na otázku viny. Ale když nám tu otázku položili: Je Lujza Kadaniková vinna, že s úmyslem zavraždit ho zastřelila svého manžela Jana Kadaníka? -

mi, kiu estis la unua laŭvice, sen meditado diris Jes, ĉar vere ŝi intencis murdi lin kaj faris tion. Kaj okazis, ke ĉiuj dek du asizanoj respondis Jes.

Poste ekregis embarasa silento; mi ekrigardis la kvar virinojn en la asizo. Ili mienis senindulge kaj preskaŭ solene, kvazaŭ ili ĵus finus batalon en intereso de la homa familio.

Kiam mi revenis hejmen, elvortigis mia edzino Lída, pala pro ekscito: Nu, kiel ĝi finiĝis? Kun Luiza? mi diris mekanike. Per dek du voĉoj kulpa. Kondamnita al la morto per pendumo. Tio estas terura, elspiris Lída kun naiva krueleco, sed ŝi meritis tion!

Tiumomente io krevis en mi, la streĉo aŭ kio. Jes, mi kriis al Lída kun ekscito, kiun mi mem ne komprenis, ŝi meritis tion, ĉar ŝi faris stultaĵon! Memoru, Lída, se ŝi pafus lin en la tempion anstataŭ en la nukon, ŝi povis aserti, ke li memmortigis sin, ĉu vi komprenas, Lída? Tiam ŝi povus esti liberlasita - Memoru, en la tempion!

Mi brufermis post mi la pardon; mi bezonis esti sola. Kaj por ke vi sciu, mia revolvero estas ĝis nun en la nefermita tirkesto; mi ne forigis ĝin."

já, který byl první na řadě, jsem bez rozmýšlení řekl ano, protože opravdu měla úmysl zavraždit ho a učinila to. A stalo se, že všech dvanáct porotců odpovědělo ano.

Pak bylo zaražené ticho; já jsem se podíval na ty čtyři ženy v porotě. Měly výraz tvrdý a skoro slavnostní, jako by právě byly svedly jakýsi boj v zájmu lidské rodiny.

Když jsem se vrátil domů, vyhrkla na mne má žena Lída, bledá vzrušením: Tak jak to dopadlo? S Lujzou? řekl jsem mechanicky. Dvanácti hlasy vinna. Odsouzena k smrti provazem. To je strašné, vydechla Lída s naivní krutostí, ale patřilo jí to!

V tu chvíli to ve mně prasklo, to napětí či co. Ano, rozkřikl jsem se na Lídu s podrážděností, kterou jsem sám nechápal, patřilo jí to, protože udělala hloupost! Pamatuj si, Lído, kdyby ho byla střelila do spánku místo do týlu, mohla tvrdit, že spáchal sebevraždu, rozumíš, Lído? Pak by mohla být osvobozena - Pamatuj si, do spánku!

Práskl jsem za sebou dveřmi; potřeboval jsem být sám. Abyste věděli, ten můj revolver je podnes v té otevřené zásuvce; já jej neodklidil."